67-a jaro n-ro 201 2026:5

la lampiro



Laboro kondukas al oro

James Piton

Novaj titoloj haveblaj en la libroservo de EASP



easp.org.br/butiko

Enhavo

4 **Vortoj de la redaktanto**
Kio pri ĉeestaj renkontiĝoj?

5 **Gratulinde**
UEA lanĉis gravan legokampanjon

6 **Imaga interparolo kun filozofoj**
Voltaire

9 **Kovrilartikolo**
Laboro kondukas al oro

13 **Recenzo**
Ĉeriza Ĝardeno - rakontoj, noveloj kaj dramoj

14 **Esplorangulo**
La unua portugallingva traduko de la Fundamento de Esperanto

18 **Iom da poezio**
Drivanta poemo

19 **Movado**
E-kongreso de EASP

20 **Kino kaj aliaj arto**
Perfektaj tagoj

21 **Juvele**
Pura poezio

22 **El mia vidpunkto**
Pripensante valorojn

23 **Iom da gramatiko**
Dekstremano / kunalie

25 **Eltiraĵo**
Bankaj fraŭdoj tra la mondo

***Kovrilbildo**: Ora medalo aljuĝita al la filatela kolekto de James Piton prezentita dum la Nacia Filatela Ekspozicio okazinta en aŭgusto 2026 en Ribeirão Preto-SP, Brazilo.*

la lampiro

67-a jaro n-ro 201 2026:5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

La Lampiro esta publikigita laŭ la permesilo Krea Komunaĵo CC-BY, krom se en la artikolo aperas alia indiko.

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo
Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo
Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro
Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silva

Konsilantaro
Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto
Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2026

Simpla Membro	R$ 200,00
Subtena Membro	R$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R$ 100,00

Kio pri ĉeestaj renkontiĝoj?

Paulo Sergio Viana

Okazis la 18-a Kongreso de Esperanto de EASP. Ĝi estis bonega evento. Riĉenhava, bonetosa, vigla kaj interesa. Prelegoj, diskutoj kaj informoj abundis, kio montras, ke nia kulturo estas vigla kaj entuziasma. Aparte plaĉis vidi inter la kongresanoj entuziasmaj gejunuloj, kiuj promesas luman estontecon por nia movado.

La kongresejo bonege funkciis, la libroservo de EASP estis unu el la plej allogaj eroj en la tuta programo. Lanĉiĝis aŭ relanĉiĝis entute ok novaj libroj, inter kiuj du tre belaj infanlibroj. Mi invitas vin viziti nun la virtualan butikon de nia asocio.

Elstara programero en la kongreso estis la vigla diskuto, kiu okazis en la dimanĉa mateno, sub la tre kompetenta kaj energioplena Wilian Gomes. Ĝi alportis multajn bonajn ideojn, multajn stimulajn pensojn pri nia rolo kiel Esperantistoj, en Brazilo. Tia programero meritas ree kaj ree ripetiĝi, en niaj rondoj. Gratulon!

Ne tre agrabla noto estas la kvanto da kongresanoj. Denove ĝi iomete malaltiĝis. Ĉu ni jam ne valorigas ĉeestajn renkontiĝojn?

Kion vi opinias pri tia fenomeno, kara leganto?

Kompleta gramatiko de la tupia lingvo

Francisco V. Lorenz



easp.org.br/butiko

UEA lanĉis gravan legokampanjon

Universala Esperanto-Asocio antaŭ nelonge lanĉis gravan, apogindan kampanjon al la tutmonda Esperantistaro. Ĝi meritas ĉies atenton.

Temas pri invito al ĉiu, kiu interesiĝas pri literaturo kaj ĝenerale pri kulturo, en nia medio. Oni invitas legantojn okupiĝi pri gravaj verkoj en nia literaturo: “Winnie-la-pu”, kiu fariĝas centjara, mejloŝtona libro. Ne nur la originalo estas rava verko, sed la traduko en Esperanto montriĝis altnivela. La enhavo estas amuza, inteligenta, surpriza kaj kortuŝa. Ĝi estas tute taŭga por legado en kursoj kaj retaj grupoj. La retejo “UEA facila” okupiĝis pri ĝi.

La libroservo de UEA disponigas tiun gravan verkon al la publiko, nun per specialaj ofertoj. Legu pli pri tio en la Gazetaj Komunikoj de UEA n-ro 1340.

Vizitu la retejon pri la kampanjo:
https://benfeitoria.com/projeto/esperantoemsuasmaosrio2026





IOM DA FILOZOFIO

Imaga interparolo kun filozofoj

José Mauro Progiante

En Ferney kun Voltaire, post venko kontraŭ fanatikeco

(Ferney, Francio, marto 1765)

Filozofio kaj juro estas por mi fascinaj studkampoj, kaj ili multe pensigas min kiam ili interkruciĝas, kiel okazis en la 18-a jarcento, kiam la filozofo Voltaire dediĉis sin al la rehabilitado de la memoro de Jean Calas, protestanta ŝtofkomercisto, viktimo de unu el la plej frapaj juĝaj eraroj en la historio.

Pro tio mi decidis vojaĝi en la tempo al la jaro 1765, por atingi la urbeton Ferney, kie li loĝis, tuj post la venko, kiun li atingis sekve de sia senlaca batalo kontraŭ religia maltoleremo.

Mi trovis Voltaire en lia ĝardeno, leganta leteron kaj samtempe observanta laboristojn. Li jam estis pli ol sepdekjara, maldika, kun viglaj okuloj.

— Sinjoro Voltaire, mi venas el la dudekunua jarcento. Mi elektis ĉi tiun momenton ĉar vi ĵus gajnis unu el viaj plej gravaj bataloj.

Aŭdinte, ke mi venas el la estonteco, Voltaire ne montris la surprizon, kiun mi atendis. Li nur rigardis min kun scivolemo, kvazaŭ la afero estus tute ebla. Eble al homo tiel klera kaj malferma al novaj ideoj ŝajnis nature imagi, ke iam ankaŭ vojaĝoj tra la tempo fariĝos realaj.

— Se vi parolas pri Calas, la venko ne estas mia. Ĝi estas de mortinto, kiu finfine ricevis justecon tri jarojn tro malfrue.

— Jean Calas estis protestanto, akuzita mortigi sian filon por malhelpi

lian konvertiĝon al katolikismo. Li estis torturita kaj ekzekutita, kaj vi batalis por pruvi lian senkulpecon.

— Kaj por pruvi ion pli gravan: kiam fanatikeco eniras tribunalon, juĝisto povas fariĝi pli danĝera ol krimulo. Religio devus fari homojn pli bonaj. Kiam ĝi igas ilin torturi unu la alian, io terure misfunkciis.

— Pro tiu afero vi verkis la Traktaĵon pri toleremo. Ĉu toleremo estas unu el viaj ĉefaj filozofiaj principoj?

— Kompreneble. Ni ĉiuj estas malfortaj, eraremaj kaj sensciaj pri multe pli da aferoj ol ni konfesas. Tial estas absurde persekuti alian homon pro tio, ke li eraras alimaniere ol ni. Mi kontraŭbatalas fanatikecon, superstiĉon, persekuton kaj la uzon de religio por silentigi la racion. Ne konfuzu tion kun ateismo. Mi kredas je Dio, sed mi ne kredas, ke Dio bezonas torturistojn por defendi lin.

— Do vi estas deisto.

— Se vi bezonas etikedon, tiu taŭgas sufiĉe bone. Mi preferas Dion kompreneblan per racio kaj naturo ol Dion uzatan kiel pretekston por bruligi homojn.

Mi rigardis la ĝardenon ĉirkaŭ ni kaj memoris lian plej faman rakonton.

— En Kandido vi mokas la ideon, ke ni vivas en la plej bona el ĉiuj eblaj mondoj.

— Post militoj, malsatoj, malsanoj kaj tertremoj, oni bezonas grandan imagopovon por rigardi la mondon kaj diri, ke ĉio estas perfekta.

— Ĉu la tertremo de Lisbono(*) influis vin?

— Kompreneble. Miloj mortis. Diri al suferanto, ke lia sufero estas necesa parto de perfekta plano, povas esti nur maniero klarigi la mondon sen vere rigardi ĝin.

— Kaj tial Kandido finiĝas per la ideo, ke ni devas “kultivi nian ĝardenon”.

Li montris al la ĝardeno antaŭ ni.

— Kiel vi vidas, mi provas sekvi mian propran konsilon. Ne sufiĉas diskuti pri la mondo: oni devas fari ion en ĝi.

Efektive, Voltaire ne nur kultivis ĝardenon. Li transformis Ferney, helpante alveni metiistojn, konstrui domojn kaj disvolvi la vilaĝon. Kaj lia domo ricevis tiom da intelektuloj,

(*) Forta tertremo detruis Lisbonon en 1755. Oni taksas, ke mortis inter 10.000 kaj 40.000 loĝantoj.

nobeloj kaj scivolemuloj, ke li fariĝis konata kiel la “gastejestro de Eŭropo”.

— Via vivo estis sufiĉe movoplena: Bastilo, ekzilo en Anglio, la jaroj kun Émilie du Châtelet, disputoj kun Frederiko de Prusio...

— Mi ĉiam havis talenton por koni potenculojn kaj poste doni al ili kialon bedaŭri, ke ili konis min.

Mi ridis kaj decidis rakonti al li kuriozaĵon el la estonteco.

— En mia tempo oni atribuos al vi tre faman frazon: ke vi malaprobas tion, kion iu diras, sed defendus ĝis la morto lian rajton diri ĝin.

Li levis la brovojn.

— Bela frazo. Ĉu mi diris ĝin?

— Ne.

— Do la estonteco estos tre ĝentila kun mi: ĝi donos al mi bonajn frazojn sen la peno verki ilin.

— Sed ĝi bone resumas vian defendon de libereco de penso.

— Tiam mi pardonas la falsan aŭtorecon. Sed memoru: libereco de penso ne signifas, ke ĉiuj pensoj estas same bonaj. Homo rajtas diri sensencaĵon, kaj la aliaj rajtas respondi, ke ĝi estas sensencaĵo.

Mi rimarkis, ke novaj vizitantoj alproksimiĝas al la domo. La “gastejestro de Eŭropo” baldaŭ havos aliajn gastojn, do mi faris mian kutiman lastan peton:

— Sinjoro Voltaire, kian mesaĝon vi sendus al la dudekunua jarcento?

Li momenton silentis — io eble malofta ĉe Voltaire — kaj poste respondis:

— Ne timu dubi. Tiu, kiu certas pri ĉio, povas fari terurajn aferojn por devigi aliajn havi la saman certecon. Kaj kiam iu petas vin malami homon en la nomo de Dio, de la patrujo aŭ de iu granda vero, unue demandu, kiu profitos de via malamo.

Li denove turnis sin al sia ĝardeno. Mi revenis al mia jarcento pensante, ke Voltaire pasigis sian vivon batalante kontraŭ fanatikeco, sed estis tro saĝa por kredi, ke tiu batalo baldaŭ finiĝos.

Laboro kondukas al oro

James Piton


Poŝtmarkoj estas ĉiam malpli uzataj en la lastaj jardekoj, kun la perpoŝtaj mesaĝoj reduktitaj al unu triono de la iama poŝta trafiko. Sed la plurmiliardoj de produktitaj poŝtmarkoj ekde 1840 plu trovas sian lokon en kolektantaj albumoj tra la mondo kaj en vigla merkato. Kaj ne nur, la nekalkuleblaj poŝtaj stampoj kaj aliaj oficialaj poŝtaj dokumentoj havas la atenton de kolektantoj. Unu el niaj asocianoj estas aktiva filatelisto, kiel nomiĝas tiuj kolektantoj. “Mi serioze ekkolektis filatelaĵojn pri Esperanto nur kelkajn monatojn post mia eklerno de la lingvo, fine de 1988, kaj de tiam mi dediĉas min al tema filatelo”, rakontas la komputilisto James Rezende Piton, el Paulínia-SP. Tema Filatelo estas unu el la branĉoj difinitaj de FIP-Internacia Filatel-Federacio, kaj en tiu aktivaĵo oni rakontas pri la aspektoj de iu difinita temo kaj pravigas aŭ ilustras la asertojn per filatelaĵoj. La temoj povas esti plej diversaj, kulturaj, naturaj, teknikaj.

La kolekto de James pri Esperanto (kun la titolo “Babelo estu detruita!”) havis longan “karieron” inter 1989 kaj 2009, partoprenante lokajn, naciajn kaj internaciajn ekspoziciojn. Li estas membro ankaŭ de Esperanto-Ligo Filatelista (ELF-AREK, http://kolektado.esperanto.cc), faka asocio kunlaboranta kun UEA, kiu kunligas kolektantojn de diversaj esperantaĵoj. Dum sia serĉado de Esperanto-filatelaĵoj, li ofte trovis ion interesan pri aliaj lingvoj. “Mi pli kaj pli miris, ke ne estas konataj filatelaj kolektoj pri la temo ‘lingvoj’, ĉar kun ĉiu filatelaĵo la kolektantoj havas en siaj manoj specimenon de la universo de la lingvoj”, li diras. Li komencis skizi kiel rakonti tiun historion. “Ĉiu tema filatel-kolekto ne estas hazarda amasigo de samtemaj filatelaĵoj. La ‘rakontoj’ estas en filatelaj ekspozicioj taksataj laŭ la logika sinsekvo de la ĉapitroj, kun koheraj argumentoj kaj la taŭga ilustrado per la oficialaj filatelaĵoj”, James klarigas. “Mi pensis per tio vastigi mian nur-esperantan kolekton al ekspoziciaĵo pri lingvoj

ĝenerale. Tio povus altiri pli da atento al Esperanto, kiu fariĝus kulmina ĉapitro en prezentaĵo pri la valoro de la lingvoj en nia mondo."

Tiel li faris tra la lastaj 15 jaroj, studante ne nur interesajn faktojn pri la lingvoj, sed ĉefe kiel ilustri tiujn aspektojn, ĉar nur oficiale eldonitaj poŝtmarkoj, antaŭafrankitaj kartoj kaj kovertoj, poŝtaj stampoj, telegramformularoj k.s. estas akcepteblaj. La proksimume 6 mil lingvoj kunportas sennombrajn informojn pri la diverseco de la homa aliro al interkomunikado, sed la lingvoj ne estas egale reprezentataj sur la poŝtmarkoj en la lastaj pli ol 180 jaroj. "Eble ne pli ol 300 lingvoj troviĝas presitaj sur filatelaĵoj", taksas la kolektanto. "Sur la poŝtmarkoj kaj aliaj filatelaĵoj de siaj kolonioj, la koloniantaj landoj uzis sian propran lingvon, ne la lokajn. Papuo-Nov-Gvineo, la lando kun plej granda lingva diverseco en la mondo (pli ol 800 lingvoj) havis siajn poŝtmarkojn eldonitajn ekskluzive en la angla, kvankam nur 1-2% el la landa loĝantaro ĝin parolas. Tri kvaronoj de la 10 milionoj da papuonovgvineanoj parolas kreolan lingvon, la tokpisinan, kiel komunan nacian lingvon."

Filipinoj estas alia ekzemplo, ekstrema ekzemplo, de la kolonia pensmaniero. Hispana kolonio ĝis la fino de



la 19-a jarcento, la unuaj poŝtmarkoj por tiu pacifika insularo estis eldonitaj en la hispana. Post milito inter Hispanio kaj Usono, Filipinoj fariĝis usona teritorio ĝis 1935, kaj en tiu tempo la filatelaĵoj estis eldonitaj nur en la angla. Inter 1942 kaj 1945, forta japana okupacio aperigis la poŝtmarkojn en la japana lingvo. Kun la fino de la Dua Mondmilito, la filipinanoj sukcesis sendependigi sian landon kaj finfine aperis la unuaj poŝtmarkoj en la ĉefa loka lingvo, la filipina, kiu baziĝas sur la tagaloga lingvo.

La reformita kolekto de James gajnis la titolon "Tra la Instalaĵoj de Babelturo" ĉar en maturaĝo la aŭtoro konsideris, ke la originala titolo "Babelo estu detruita!", iom konata inter brazilaj filatelistoj, povas doni la im-

preson, ke esperantistoj celas unulingvecon per la “detruo de Babelo”, t.e., detruo de la lingva diverseco. “Mia ideo ekde la unua versio tamen ĉiam estis valorigi tiun diversecon kaj konsciigi la legantojn pri ĉiu lingvo kiel io konservinda”, li substrekas.

Sur la unua el 60 folioj de la nova ekspozaĵo, la indekso estas prezentata kvazaŭ butonaro de lifto, kun ĉiu ĉapitro kiel “etaĝo” de la alta babela konstruaĵo. La ĉapitroj kovras la fizikajn kondiĉojn por estiĝo de la homaj lingvoj (parol- kaj aŭskult-organoj), la strukturon kaj gramatikon de lingvo, la kulturajn, la politikajn kaj historiajn aspektojn. Inter la kuriozaĵoj de la ilustra materialo, troviĝas poŝtmarko el Butano, kiu en 1973 estis eldonita en serio de vinilaj diskoj, kiuj entenas →



Unu el la paĝoj de la kolekto

mallongajn paroladojn, kaj poŝtan dokumenton el la iama Respubliko Venecia, uzitan en la jaro 1669. En tema kolekto ne gravas la jaro aŭ la lando, kie eldoniĝis filatelaĵo – ĝi devas kontribui al la logika sinsekvo de la ‘rakonto’, kiel oni vidas en specime-na paĝo: la unua brita antaŭafrankita koverto el 1841, kun antaŭafrankita portugala kristnaska karto el 1941 kaj poŝtmarko-bloko el 1996 ankaŭ el Portugalio i.a. rakontas pri la kontaktoj inter civilizacioj, eklerno de la lokaj lingvoj kaj transdono de eŭropa lingvo.

La ekspozaĵo estas ekzemplo mem pri la internacia lingva demando: ĝi devis esti verkita en la angla, ĉar nur unu el la lingvoj oficiale agnoskitaj de la Internacia Filatel-Federacio rajtas esti uzata por la tekstoj.

La atendata kolekto fine debutis en la lasta aŭgusto en la XVIII BRAPEX, nacia filatela ekspozicio, en Ribeirão Preto-SP, kaj ricevis entuziasmajn opiniojn de aliaj kolektantoj. Por surprizo de la aŭtoro, okazis io absolute nekutima por konkuranta ekspozaĵo, kiu debutas: ĝi atingis la plej altan medalon, la grandoran, pro aljuĝitaj 91 poentoj el 100, kaj estis elektita de faka ĵurio la plej bona inter la temaj kolektoj prezentitaj en tiu ekspozicio. Unu monaton poste, la kolekto estis sendita al Urugvajo, al trinacia ekspozicio “Montevideo 2026”, kaj la rezulto ripetiĝis, kun la samaj poentoj, samranga medalo kaj la ĉefpremio por temaj kolektoj. La rango de tiuj medaloj tuj venigas respondecon al la apenaŭ debutinta kolekto. Pro la rezulto, laŭlonge de la venontaj tri jaroj, laŭ la reguloj por partopreni en naciaj ekspozicioj, la prezentaĵo ne nur rajtas, sed ĝi nepre devas adaptiĝi kaj kreski de 60 al 96 folioj. “Teni la kvaliton en tiu kresko estas malfacile, sed aliflanke mi povos pritrakti tre interesajn lingvajn aspektojn kaj uzi materialon, kiun mi jam havas. Ili forestis pro spacomanko”, li kompletigas.



RECENZO

Ĉeriza Ĝardeno - rakontoj, noveloj kaj dramoj

Paulo S. Viana

Anton Ĉeĥov (1860-1904) estas grava, tutmonde aprezata rusa aŭtoro. Li estis kuracisto (cetere studenta samtempulo de Zamenhof), kaj daŭre laboris kiel kuracisto dum sia tuta kariero kiel beletristo. Li verkis precipe novelojn kaj nelongajn rakontojn, kaj ĉi tiu valora eldonaĵo de Kaliningrado – Sezonoj (2004) proponas varian, tre riĉan kolekton da tiaj tekstoj. Per siaj plej diversaj historioj, Ĉeĥov en multaj scenoj priskribas kaj montras la animon de la rusa popolo. El ĉiaj klasoj, jen oni ridas pro liaj ironiaĵoj, jen oni miras pro iom ekstravagancaj situacioj, jen oni kompatas la suferon de senkulpaj homoj. Entute 34 rakontoj kaj noveloj, el kiuj oni povas legi tre konatajn: “La damo kun hundeto”, ekzemple.

Aparte impresa kaj kortuŝa al mi ŝajnas la rakonto “Ŝi deziras dormi”, en kiu la aŭtoro frape montras la kruelan traktadon kaj ekspluatadon de servisto, eĉ de infana servisto, fare de altklasuloj. Ĝi estas ekzemplo de tio, ke Ĉeĥov probable intime kontaktis la suferantajn popolanojn en sia lando, kiel kuracisto. Tial, ne eblas legi liajn rakontojn kaj ne pensi, ke li emis denunci la maljustan tiaman sociordon kaj la tiaman neglektadon de taŭga eduksistemo. La rakontoj en ĉi tiu bela libro estas fakte granda panoramo pri la rusa socio, en la 19-a jarcento.

La volumo finiĝas per du teatraĵoj: “Urso” kaj “Ĉeriza ĝardeno”. Ĉi tiu lasta estas bona reprezentanto de la arto de tiu aŭtoro, sur la kampo de dramoj, ĉar ankaŭ en ĝi li fariĝis sufiĉe konata kaj aprezata, ĝis la nuna tempo. Pluraj aliaj liaj dramoj furoris kaj ĝis nun estas legataj kaj metataj en scenejojn.

La lingvo en ĉi tiu eldono estas bona kaj flue legebla. Malmulte da stumbletoj troviĝas, kiuj tute ne ĝenas la leganton. Ĝi plene meritas varman rekomendon de mia flanko.

Aparta permesilo por ĉi tiu artikolo: CC BY-NC-ND

La unua portugallingva traduko de la Fundamento de Esperanto

Miguel Bento

Iam dum miaj esploroj pri la historio de nia lingvo mi trovis la informon, ke Bruno de Mendonça Lima (1895-1983) tradukis la Fundamenton de Esperanto al la portugala.[1] Mi registris tiun informon en miaj notoj, kvankam mi kredis ĝin ne vera, rezultinta el iu konfuziĝo, ĉar nenie mi sukcesis trovi iun ajn spuron pri tiu traduko.

Tio tamen ŝanĝiĝis antaŭ tri jaroj, kiam mi okupiĝis pri la transdono de parto de la materialo de la likvidita Biblioteko Dirceu Porciúncula, de la iama Esperantista Societo de Rio Grande, al Biblioteko Ary Zamora, de Gaŭĉa Esperanto-Asocio. Imagu mian surprizon kiam mi ekvidis, inter la ceteraj libroj kaj periodaĵoj (kelkaj ankaŭ raraj aŭ eĉ unikaj), du fotokopiojn de tiu preskaŭ senrevene perdita traduko!

Sed kial tiu verko restis longe en obskuro, kaj kiel eblis tiu neatendita retrovo? Nu, bonŝance akompanas la ekzemplerojn klariga letero de la tradukinto, kiun mi ĉi-sube reproduktas senŝanĝe (ni pardonu la mistajpojn kaj la lingvajn stumblojn de la tiam maljuna samideano!)[2]

Pelotas, la 21 julio 1981

FUNDAMENTO DE ESPERANTO. – L. L. ZAMENHOF

Tradukita en la portugalan lingvo

de Bruno de Mendonça Lima

Ĉi tiu fotokopio estas ekstraktita el rara libreto, kies ekzistas nur unu originala ekzemplero en la mondo. Tia estas la historio de tiu rara libreto:

1. **Pelotas**. En: Esperantaj Societoj en Sud-riogrando. FLORES, Alberto; SANGUINETTI, Ivo. Konsultebla en web.archive.org/web/20081123082841/http://historio.esperanto.org.br/pelotas_eo
2. Originalo konsultebla en archive.org/details/letero_bml

En la jaro 1911, Bruno de Mendonça Lima, deksesjara studento de Leĝoscienco en Rio de Janeiro, skribis al Dr^o ZAMENHOF, proponante sin kiel tradukonto de Fundamento de Esperanto. Dr^o Zamenhof respondis sciigante ke, por traduki la Fundamenton estus necese peti permeson al la Librejo Hachette en Parizo. La Librejo doni la permeson kaj proponis sin kiel eldonisto de la traduko.

La junulo farias la tradukon, kiu estis aprobita de Hachette. La sendo de la originaloj kaj de la provaĵoj de Rio al Parizo kaj returne estis tre malrapida. La lasta provaĵo alvenis al Rio en la jaro 1914. Pro la unua Granda Milito, Hachette ne plu interesiĝis pri la eldono de la traduko. Unu kopio de la lasta provaĵo restis kun la tradukinto. Tiu kopio, bindita, estas la rara libreto.

La juna tradukinto estas nun okdeksesjara maljunulo, certe unu de la plaj antikvaj esperantista de Brazilio.

Bruno de Mendonça Lima

Emerito profesoro de la Universitato de Rio Grande do Sul.-

(FAKULTATO DE LEĜOCIENCO DE PELOTAS).-


Ne necesas plu komenti pri tiu letero: ĝi mem tute bone senvualigas la tutan aferon. Sed mi aldonu ke, eĉ pli mirige, enestas ankaŭ fotokopio de la poŝtkarto, kiun Zamenhof sendis al Bruno por respondi al lia peto! Jen la enhavo:[3]

E.S. [Estimata Samideano]

Se Vi deziras traduki la „Fundamenton", volu peti pri tio la permeson de la firmo Hachette et C^ie en Parizo.

Via

L. Zamenhof



Dre L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

E.!
Se Vi deziras tra-
duki la Fundamenton,
volu peti pri tio la
permeson de la firmo
Hachette et Cie a
Parizo. Vi

3. Same alŝutita al Internet Archive: archive.org/details/poshtkarto_llz_bml

Unue ŝajnis al mi, ke temas pri ĝis nun ne konata korespondaĵo de Zamenhof, sed poste mi konstatis, ke fakte ĝi jam antaŭe estis iel elfosita de Jean Amouroux. La enhavo estis reproduktita de ludovikito en la volumo *destino de ludovika dinastio* (11-40-a, p. 2478). Tie aperas ankaŭ la ricevodato (21/06/1911), informo kiu ne videblas en la bildo (mankas kopio de la alia flanko). Bedaŭrinde mi tute ne scias, kie nun troviĝas la originaloj de tiu poŝtkarto kaj de la lasta presprovaĵo, se ili entute ankoraŭ ekzistas, sed nu, almenaŭ la enhavo estas savita: nun ĉiuj povas libere konsulti ilin rete![4]

Nur pli ol cent jarojn poste eldoniĝis kompleta libroforma traduko de la Fundamento, redaktita de Túlio Flôres (BEL, 2015)! Sed jam antaŭe aperis tradukoj de la Fundamenta Gramatiko kaj de la Ekzercaro, fare de Ismael Gomes Braga[5], kaj, kvankam ne estis portugallingva eldono de la Universala Vortaro, ĝiaj radikoj kompreneble estis inkluzivitaj en diversaj vortaroj.[6] Cetere, en la versio de Mendonça Lima la Antaŭparolo ne estis tradukita, same



(*) Bruno de Mendonça Lima (1895 - 1983)

kiel la frazoj de la Ekzercaro (Bruno okupiĝis nur pri la finaj vortlistoj).

Jen, do, la vivhistorio de tiu forgesita libro. Sed kio pri ĝia tradukinto, Bruno de Mendonça Lima? Sufiĉas rapida esploro por lerni, ke li estis elstara advokato, juristo kaj profesoro pri juro. Baldaŭ post sia diplomiĝo en Riodeĵanejro li revenis al Pelotas kaj iĝis docento en la tiea Fakultato pri Juro, hodiaŭ parto de la Federacia Universitato de Pelotas (UFPel). Bruno poste direktis la fakultaton dum pli ol tri jardekoj, inter 1931 kaj 1965, iĝante la plej grava figuro de ĝia historio – tiel grava, ke ĝi estas alnomata "Domo de Bruno de Mendonça Lima", kaj ke

4. archive.org/details/fundamento_de_esperanto_bml

5. En *Gramática de Esperanto* (KKE, 1-a eld. 1952, 2-a eld. 1959). Eble ankaŭ pli frue, en *Exercícios de Esperanto* (BEL, 1939) - ĉi tiun verkon mi ankoraŭ ne povis konsulti.


6. Ekzemple *Esperanta Radikaro (Oficialaj Radikoj) kun Portugala Traduko*, de Alberto Couto Fernandes (Eldona Industria Entrepreno “O Norte”, 1922).

(*) Fonto: MARÇAL, João Batista. **Memória Histórica dos Socialistas Gaúchos**. Memeldono, 1987; p. 42.

bronza busto de li salutas la studentojn en la enirhalo!

Bruno estis fondinta membro de *Partido Socialista Brasileiro* (PSB), kadre de kiu li kandidatiĝis al la posteno de ŝtatestro de Suda Riogrando en 1950. Aldone Bruno estis, dum iom da tempo, estrarano de *Bibliotheca Pública Pelotense*, same kiel direktoro de la revuo *Illustração Pelotense* kaj de la ĵurnalo *A Opinião Pública*. Oni povus ankoraŭ multe plilongigi lian vivresumon, sed mi ne flanklasu la fakton, ke li estis membro de la sepkapa komisiono de juristoj kiuj finpretigis, en 1932, la unuan balotleĝaron de Brazilo. Tiu gravega leĝaro "starigis la bazojn de la moderna balotsistemo de la lando, establante la sekretan voĉdonon, la virinan voĉdonrajton, la sistemon de proporcia reprezentado kaj la Balotan Justicon"![7].

Laste, sed ne balaste, mi registru ĉi tie enigmon, kiun mi ankoraŭ ne sukcesis solvi. Laŭ informo de Alberto Flores, Bruno ankaŭ "tradukis en la portugalan lingvon la libreton de Theophile Cart: *Unuaj lecionoj de E-o*, eldonita[n] de Hachette, sed la tuta eldono


ESPERANTO
Verkaro de
Dr ZAMENHOF
ELDONO PORTUGALA
L. L. ZÁMENHOF
Fundamento de Esperanto
(Fundamento do Esperanto)
TRADUZIDO COM PERMISSÃO DO AUCTOR
POR
BRUNO MENDONÇA LIMA, Brazileiro
FRANCISCO ALVES & Cª
RIO DE JANEIRO
166, RUA DO OUVIDOR, 166
Filiaes:
65, RUA DE S. BENTO, 65
SÃO PAULO
RUA DA BAHIA
BELLO HORIZONTE
LIBRAIRIE HACHETTE & Cie
79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79
PARIS
1914
Tous droits réservés.

perdiĝis dum la transportado al Brazilo."[8] Nu, ŝajnas al mi ke ĉi-foje Alberto ja iom konfuziĝis! Kial Bruno tradukus *Premières leçons d'Espéranto*, se Antônio Caetano Coutinho jam estis farinta tion? Nu, indas memori, ke en tiuj fruaj tempoj aperis ankaŭ "ampleksigita adapto" de *Premier Manuel de la Langue Auxiliaire Esperanto*, la "ruĝa broŝuro" de Carlo Bourlet. Tradukis ĝin Murillo Furtado, kiu tiam loĝis en Italio, kie la libro estis eldonita. Mi demandas min, ĉu tiu katastrofa perdo de (preskaŭ?) tuta eldono efektive okazis, kaj, se jes, pri kiu pionira verko temis...

7. **Entrevista com Bruno de Mendonça Lima em 1979**. Entrevistador: Prof. Hélgio Trindade. Citaĵo el la resumo; disponebla en cedap.ufrgs.br/xmlui/handle/20.500.11959/8355
8. **Kelkaj pioniroj de la Esperanto-movado en Suda Riogrando - Brazilo**. FLORES, Alberto. En *Almanako Lorenz 2017*, p. 195-199.

Maria Nazaré Laroca

Drivanta poemo

Sen permeso de l’ aŭroro
pala plenluno ŝvebas
en ĉi frida junia mateno.

Ankaŭ ŝvebas l’ animo
drive de doloraj tempoj
serĉante miraklon.

E-kongreso de EASP

Je la 26 - 27-a de septembro 2026, okazis la 18-a Kongreso de Esperanto de la Ŝtato San-Paŭlo, en Brazilo. Tiun tradician eventon, en la urbo S. José dos Campos, partoprenis dekoj da Esperantistoj el pluraj brazilaj Ŝtatoj. La temo de la kongreso, “Esperanto kaj interpersonaj rilatoj en la cifereca epoko”, estis motivo por profitodonaj diskutoj, rilate la rolon de Esperanto en la moderna mondo.

En la programo oni prezentis 13 prelegojn pri plej diversaj temoj, kaj estis ankaŭ la virtuala partopreno de la hungara aktivulino Stela M. Berger. La Esperantistoj Cícero G. Nunes, Dirce Sales kaj Tânia Paixão proponis artajn prezentojn.

Fine de la programo, okazis riĉenhava diskuto inter la ĉeestantoj, pri la temo de la kongreso. Tiuokaze, estis transdonitaj premioj al la venkintoj de konkurso pri verkado de eseetoj pri la temo de la kongreso.

Dum la tuta evento, funkciis libroservo de la organiza asocio. Cetere, estis lanĉitaj kaj relanĉitaj entute ok libroj originalaj kaj tradukitaj, en Esperanto.



Perfektaj tagoj

Anna Lobo de Carvalho

Originala titolo: Perfect Days
Direktoro: Win Wenders
Scenaristo: Takuma Takasaki
Aktoroj: Koki Yakusho, Tokio Emoto, Arisa Nakano kaj Yumi Yamada
Tipo de filmo: Dramo
Lando: Germanio kaj Japanio
lanĉo? 24.03.2026
Tempodaŭro: 123 minutoj

Kiam mi pensis pri tio, kiun filmon mi priparolu ĉi-foje, mi memoris pri tre speciala filmo en Netflix. Vera perlo. Temas pri la germana/japana filmo “Perfektaj Tagoj”. Ĝi fakte estas filmo kiu ne havas multe da okazaĵoj kaj grandaj turniroj. Ĝi estas lanta, sed ĝi kaptas nin.

Ĝi rakontas pri Hirayama, homo kiu jam ne estas plu tiom juna kaj kiu laboras kiel purigisto de publikaj necesejoj en la urbo. Do, montras kiel li vivas sian ĉiutagaĵon, tre simple, tre sindedicĉeme kaj diligente. Li ankaŭ havas hobiojn kiel fotadi kion li vidas kaj legi malnovajn librojn.

Oni tiel atentigas pri la simplaj aferoj kiuj okazas al ni, kaj ĝui la simplecon. Sed, tamen oni ankaŭ povas demandi, kio estas malantaŭ elekto tiel vivi? Kion li volas kontroli en sia vivo? Ĉu tiel li fuĝas senti kaj plene vivi? Kio okazis al li? La respondo estas malferma. Nur ia ideo pri kio okazis, oni povas imagi pro neatendita vizito de familiano.

Ĉio en la filmo estas tre interesa. Mi speciale ŝatis la muzikon kiu aldonas specialan etoson al la filmo. Ankaŭ mi ŝatas la scenojn kun la detaloj pri liaj ĉiutagaĵoj. Kaj menciebla estas la aktoro kiu rolas la ĉefan homfiguron – Koji Yahkusho. Li estas nekredeble bona en la filmo… Kaj je la fino, li ja montras kiel elstara li estas.

Ĉu scivolema? Mi esperas ke mi instigis vin spekti ĉi tiun belan filmon, kiu estas trovebla en la plataformo Netflix. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Pura poezio

Paulo S. Viana



La libro “Aventuro”, de la rusa aŭtorino Tatjana Tereĥova, estas juvelujo plena de gemoj. La 60-paĝa volumeto valoras multe pli ol ĝia negranda paĝokvanto sugestas. Ĝin eldonis en bela formato, sub malmolaj kovriloj, en altkvalita papero, Eldonejo Impeto, en Moskvo.

Ĝi konsistas el du ĉefaj partoj. La unua, el “Versaĵoj”, delikate lirikaj, kaj kun foje viglaj metaforoj:

“Pri kio songas ursoj dum la vintro?Pri steloj kiuj falas sur la teron.”

Ĉi tiu parto finiĝas per kolekto da hajkoj, kiuj aparte plaĉas al mi. (Ne estas facile vigle poemi per tiaj miniaturaj poemetoj!)

“Dormas la urbo.
Lumas lanternoj por ke
ĝi timu nenion.”

La dua parto konsistas el rakontoj kaj fabeloj. La sama etoso plu ĉeestas, kaj la delikateco de poezia prozo faras la legadon flua kaj malpeza. Unu el la fabeloj donas titolon al la tuta volumo:

“Iun aŭtunan vesperon malgranda musido sidis sur la sojlo de la musa dometo kaj pensis pri la vorto “Aventuro”: Ĝi estas bela longa vorto. Sed kion ĝi signifas? (...)”

La tuta libro, preskaŭ ĉiupaĝe ilustrita per mirinde belaj desegnaĵoj de Anna Striganova, enhavas la atmosferon fajnan kaj koloran de infanlibro, kies paĝoj ŝvebas antaŭ la okuloj de la leganto. Tamen, se oni senteme tralegas, oni trovas puran Poezion. Ĉiu leganto povas ĝin ĝui, kiom ajn aĝa li estas. Cetere, tia devas esti ĉiu verko porinfana: ĝi devas kontentigi infanojn de la unuaj vivojaroj, ĝis la lastaj.

Mi ripetu: vera juvelujo.

Pripensante valorojn

Milton Paulo de Lacerda

Kelkaj valoroj nomiĝas PORĈIAMAJ kiel, ekzemple, Vivo, Bono, Vero, Justeco, Amo, Beleco, ĉar ili neniam ĉesas esti gravaj, kio ajn okazos. Ili ankaŭ povas esti nomataj ABSOLUTAJ, kiel plenaj, senlimaj, esencaj realaĵoj, kiuj dependas nur de si mem por ekzisti, kontraŭe al ĉiuj fenomenoj, kiuj restas dependaj, kontingentaj, relativaj aŭ apartaj.

Prudenta homo, eĉ sen multe da edukado, deziras bonan sanon, verajn kaj sincerajn rilatojn, justajn prezojn por aĉeteblaj varoj, karesan kaj konsolan amon de amato, la akompanon de bela homo, prefere ol tiun de iu malbela. Kaj eĉ malĝentilaj, malbonkondutaj kaj krimaj homoj, iumaniere postulas tiujn valorojn, komprenatajn, ekzemple, kiel supervivo, profito, lojaleco al la bando, plena pago de ŝuldoj pro hazardludoj aŭ drogoj, kontentigo de instinktaj amoj, kaj tiel plu.


Aliflanke, kontraŭe, estas la PASEMAJ valoroj. Ili ankaŭ povas esti nomataj RELATIVAJ, danĝeraj, bonŝancaj, kontingentaj, ĉar ili okazas danĝere, pro akcidento. Ĉio, kio ekzistas, estas bona, sendube; ĝi havas sian celon kaj utilecon por iu vivanta estaĵo, homa aŭ ne; ĝi havas sian ekzistokialon, eĉ se nur sciencistoj kaj fakuloj en diversaj ekzistaj kampoj povas klarigi ĝin, kiel ekzemple okazas kun la ekzisto de insektoj kaj ĝenaj bestoj, kiel puloj, blatoj kaj ratoj.

TRANSIRA (de la latina transit = pasas) estas, kiel diras la nomo, io efemera, kiu ne daŭras, kiu iam ĉesas ekzisti. Tiel okazas pri la granda plimulto de aferoj. Heraklito de Efeso (535 a.K. – 475 a.K.), antaŭsokrata filozofo konsiderita la “patro de dialektiko”, deklaris: “Ĉio pasas, nenio restas”, surbaze de la observado de la flueco de ĉiuj aĵoj, kiel proponite en la laboro “Pri Naturo”, atribuita al li: “Oni ne povas dufoje iri tra la sama rivero, kaj oni ne povas dufoje tuŝi morteman substancon en la sama stato; pro la impeto kaj rapideco de mutacio, ĉi tiu disiĝas kaj kolektiĝas, venas kaj iras.”

(Daŭrigota sur paĝo 24)

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

1. En la fabelo *Ĉe la plej ekstrema maro* de Andersen, tradukita de Zamenhof (*Fabeloj de Andersen*, 3-a volumo), troviĝas la jena frazo: *Se mi prenus flugilojn de la matenruĝo kaj restus ĉe la plej ekstrema maro, min tamen, tien kondukus Via mano, kaj Via* ***dekstremano*** *min tenus.*

Ĉu la kunmetaĵo *dekstremano* estas ekvivalenta al *dekstra mano*? Ĉu kun ia aparta nuanco? Kiel klarigi tiun elekton?

2. En la fabelo *Folio el la ĉielo* de Andersen, tradukita de Zamenhof (*Fabeloj de Andersen*, 3-a volumo), troviĝas la jena frazo: *Sed kie estis la kreskaĵo? Kredeble mi metis ĝin kunalie en mian pakon!*

Ĉu vi bonvolas komenti la kunmetaĵon “kunalie”? Ĉu ĝi estas tute klara?

Respondoj

1. Temas pri parto de la *Psalmaro* (139:9–10). En la unua eldono de tiu kolekto (Eldonejo Hachette, 1908) fakte troviĝas la vorto *dekstremano*. Ĉi tiun formon reproduktas la *Tekstaro de Esperanto* (tekstaro.com) en la citita fabelo. Tamen tio ĉi tre verŝajne estas mispresaĵo, kaj la unua eldono de la Biblio (1926) redonas la tekston jene: *Ĉu mi okupos la flugilojn de la matenruĝo, / Ĉu mi loĝiĝos sur la rando de la maro: / Ankaŭ tie Via mano min kondukos, / Kaj* ***Via dekstra mano min tenos****.* (Notu, ke la teksto supre citita en la unua demando estas iom malsimila al tiu de la Londona Biblio.)

Ankaŭ en aliaj lingvoj la formo uzita estas *dekstra mano*. Ekzemple:

En la Portugala, laŭ la aktualigita versio de João Ferreira de Almeida: *Se tomar as asas da alva, se habitar nas extremidades do mar, ainda ali a tua mão me guiará e a t**ua destra me susterá*** (… via dekstra mano subtenos min).

En la Kataluna, laŭ la versio de Reina Valera (1960): *Si tomare las alas del alba y habitare en el extremo del mar, / Aun allí me guiará tu mano, y **me asirá tu diestra***.

En la Angla, laŭ la versio de Reĝo Jakobo: *If I take the wings of the morning, And dwell in the uttermost parts of the sea; Even there shall thy hand lead me, And **thy right hand shall hold me*** (… via dekstra mano tenos min).

En la Franca, laŭ la traduko de Louis Segond: *Si je prends les ailes de l'aurore, Et que j'aille habiter à l'extrémité de la mer, Là aussi ta main me conduira, Et **ta droite me saisira*** (… via dekstra mano tenos min).

Do fakte la ĝusta esprimo estas *dekstra mano*, ne la stranga *desktremano*.

2. Jen unu plia Zamenhofa uzo de *kunalie*: *… ĉi tie ne loĝas feino, kies perlo **kunalie** apartenas al la plej bonaj donoj de la vivo!*

Tiu ĉi kunmetaĵo aspektas al mi tute normala, kvankam tre malofte uzata. Fakte mi sukcesis trovi nur tiujn du ekzemplojn. Ĝi signifas: *kune kun aliaj aferoj*.

Daŭrigo de la paĝo 22

Por iom pripensi

Transira estis por mi la rava sperto spekti tiun nokton la “Koncerton en A-minora por piano kaj orkestro” de Schumann; sed hodiaŭ estas alia tago kaj, de la grandioza muzikaĵo, restas nur kelkaj akordoj, sonoregante en la oreloj de mia memoro. Provizora estis la paketo, kiam mi ĉerpis la lastan kuketon dum manĝeto. Transira estis la suna kaj tute ĉielblua tago, kiam la suno subiris kaj kun ĝi la lumo. La sateco pasis post la rostita kokido ĉe tagmanĝo, ĉar la horoj pasis kaj malsato revenis. Dum 40 jaroj, vivante la sperton de laboro, iu alfrontas la novecon de emeritiĝo kaj rimarkas, ke ĝi ankaŭ pasis.

Ĉiuj tiuj estis valoroj, sendube, sed klare pasemaj. Kiel la plena elkalkulo de la kreitaĵoj, nia listo povus esti same senfina, konfirmante la sentencon de Heraklito: “Ĉio pasas, nenio restas”.

Bankaj fraŭdoj tra la mondo

João Otávio Veiga Rodrigues

En Brazilo, lando de "firuzuloj", fraŭdoj multobligas viktimojn ĉiutage. Ĉi tie la bankoj lasas la damaĝojn en la poŝojn de siaj klientoj. Sed la fraŭdoj ne okazas nur en nia lando, sed tra la mondo.

Je la 15-a de oktobro,*"la Eŭrop-Unia Kortumo diskonigis verdikton kun nedubebla graveco por la financa sektoro de la Unio. La Tribunalo decidis, ke bankoj devas tuj rehavigi al kliento la monon pagitan okaze de nevolaj operacioj, kiel la konata "phishing", eĉ kiam la uzanto ne agis sufiĉe zorgeme. Ĉi tiu decido markas gravan turno-punkton en la jura protektado de civitanoj kontraŭ la kresko de fraŭdoj kaj identoŝteloj ĉe interreto."* (Jura Semajno – Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio - Oktobro 2 : 2026)

Poste, la bulteno klarigas: *"Ĝis ĉi tiu verdikto, estis kutima praktiko en la financa sektoro, ke bankoj prokrastis aŭ simple rifuzis repagon de la ŝtelitaj mon-kvantoj, sub la preteksto ke la kliento ne zorgis sufiĉe bone sian bankokonton, aŭ simple oni klakis sur fraŭdaj ligiloj. La bankoj uzis ĉi tiun supozatan neglektemon kiel ŝildon por eviti sian komencan respondencon. La verdikto de la Eŭrop-Unia Kortumo ordonas tujan repagon, kiel maksimume ĝis la fino de la sekvanta labortago. Krome, devas esti la banko tiu, kiu devas pruvi la ekstreme gravan neglekton de la kliento rilate la fraŭdon.*

Ofte, kibernetikaj krimuloj perfekte imitas retpaĝojn aŭ bankajn komunikojn pere de interreto, tiel ke kliento fidas pri tiu paĝo aŭ senkulpe respondas tiun retmesaĝon kaj tio estigas al li monperdon. Do, ekde nun, bankoj devos plifortigi siajn proprajn komputilajn sekurecajn mekanismojn, anstataŭ transdoni la tutan respondecon de tiuj fraŭdoj al la plej malforta parto de la banka kontrakto, tio estas la kliento."

Ĉu niaj brazilaj tribunaloj maturiĝos ankaŭ?

Finfine, inter la bankaj klientoj ekzistas gemaljunulojn, genaivuloj, kiuj, kvankam sperte vivadis, ne povas diveni la verecon de la bankaj retpaĝoj. Io devas ŝanĝiĝi en nia jura mondo.

Plia klasikaĵo de la brazila literaturo tradukita al Esperanto.

Klara de la Anĝeloj

Lima Barreto

Tradukis: Paulo S. Viana



easp